# Esperanto - La Bitbulteno 95


## ¡QUEDAN POCOS DÍAS PARA EL CONGRESO ESPAÑOL DE ESPERANTO!

Quedan muy pocos días para que empiece el 82º Congreso Español de Esperanto. Recordad que el lugar elegido este año es el imponente Complejo Educativo (antes conocido como Universidad Laboral) de Cheste, cerca de Valencia. El día 5 de septiembre tendrá lugar la bienvenida, y tendremos actividades hasta el domingo 8, pero además.quienes tengan más tiempo podrán quedarse a conocer Valencia en una serie de excursiones posteriores.

Recuerda también que es posible alojarse y comer en el propio Complejo, con precios muy favorables. Se ha ampliado el plazo para reservar hasta el 30 de agosto (no se asegura esta posibilidad para quien quiera apuntarse en el último momento)

Puedes apuntarte y conocer más detalles en la web del Congreso. Muchos otros detalles se van renovando en esta página de EventaServo. También puedes unirte al canal de Telegram https://t.me/HispanaEsperantoKongreso, para conocer las últimas novedades.

¡Nos vemos en Cheste!




## ESPERANTO EN EL MUSEO VIRTUAL SOBRE LA GUERRA CIVIL

El único museo virtual dedicado a la Guerra Civil Española contiene ahora un texto sobre el uso de esperanto en ese evento histórico.

El museo (sobre el que se puede leer más informaciones en estos artículos periodísticos:1 y 2) contiene numerosas figuras y textos sobre la guerra en todas sus facetas, desde las batallas o el contexto internacional hasta la vida cotidiana y las experiencias de las personas ordinarias. Ha sido creado (curiosamente) por un consejo académico en Canadá y se le puede encontrar en: https://vscw.ca/. La mayoría de las páginas tiene versiones en castellano, inglés y francés, y muchas de ellas en el resto de lenguas españolas.

El texto sobre el esperanto se puede leer en estas direcciones: https://vscw.ca/index.php/es/node/480 (español), https://vscw.ca/index.php/fr/node/480 (francés) y https://vscw.ca/index.php/en/node/480

(inglés)




## ESPERANTO EN RADIO 3

La cadena estatal de música y tendencias culturales, Radio 3, dedicó uno de los programas de su pódcast *Blablando* al esperanto, con una entrevista a Vicente Manzano (Viko). Puedes escucharla en este enlace.




## NUEVA CONVOCATORIA DE LOS CURSOS DE ESPERANTO EN LA UNED

La Universidad Nacional de Educación a Distancia, por medio de su Centro de Idiomas ha anunciado ya la matrícula para el próximo curso 2024-2025, en la que se incluye de nuevo el curso de esperanto, en sus dos niveles A2 y B1. La matrícula se abre el 5 de septiembre y finaliza el 22 de octubre. Estate atento.

Recordamos que los miembros de la Federación gozan de un atractivo descuento en el importe de la matrícula. ¡Una razón más para afiliarte!

## NUEVO CONVENIO ENTRE LA FEDERACIÓN Y EL MINISTERIO DE CULTURA

La Federación Española de Esperanto y el Ministerio de Cultura han firmado un nuevo convenio para regular el suministro de metadatos y miniaturas por parte de la Bitoteca de la Federación al Ministerio de Cultura, y, a través de este, al repositorio europeo Europeana, así como el uso de dichos metadatos y miniaturas por parte del Ministerio y de Europeana.

El convenio ha sido publicado en el Boletín Oficial del Estado, y también hemos recibido el permiso para publicarlo en la propia Bitoteko. En ambos lugares se puede leer el texto completo.



BOLETÍN OFICIAL DEL ESTADO

Núm. 158 — Lunes 1 de julio de 2024 — Sec. III. Pág. 77291

III. OTRAS DISPOSICIONES

MINISTERIO DE CULTURA

**13306** *Resolución de 23 de junio de 2024, de la Dirección General del Libro, del Cómic y de la Lectura, por la que se publica el Convenio con la Federación Española de Esperanto, para regular el suministro de metadatos y miniaturas.*

El Ministerio de Cultura y la Federación Española de Esperanto han suscrito, con fecha 20 de junio de 2024, un convenio para regular el suministro de metadatos y miniaturas por parte de la Federación Española de Esperanto al Ministerio de Cultura y, a través de este, a Europeana, así como el uso de dichos metadatos y miniaturas por parte del Ministerio de Cultura y de Europeana, por lo que conforme a lo previsto en el artículo 48.8 de la Ley 40/2015, de 1 de octubre, del Régimen Jurídico del Sector Público, una vez inscrito en el Registro Electrónico Estatal de Órganos e Instrumentos de Cooperación del sector público estatal, procede la publicación en el «Boletín Oficial del Estado» de dicho convenio, que figura como anexo a esta resolución.

Madrid, 23 de junio de 2024.–La Directora General del Libro, del Cómic y de la Lectura, María José Gálvez Salvador.

**LA FEDERACIÓN EN EL CONGRESO INTERNACIONAL DE ESPERANTO**

Como ya informamos en anteriores boletines, este mes de agosto el Congreso Universal de Esperanto tuvo lugar por primera vez en África. Según todos los testimonios fue un gran éxito,con una importante participación de esperantistas africanos, a pesar de las dificultades de visados y transporte.

La Federación estuvo representada en la Feria de Asociaciones que tuvo lugar el primer día, con gran aceptación e interés. En la foto inferior puedes ver el aspecto de la mesa.

Como es tradicional, durante el Congreso tuvo lugar el anuncio del resultado de los Concursos literarios de la Asociación Universal de Esperanto (UEA). Puedes leer el anuncio en este enlace o escucharlo en este otro. En este vídeo puedes escuchar el mensaje de felicitación del presidente de jurado, el escritor Miguel Fernández.



**RENOVACIÓN DE LA DIRECTIVA DE LA FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO**

El 8 de septiembre, durante el Congreso de Cheste, tendrá lugar la asamblea general ordinaria de la Federación Española de Esperanto. Los miembros de la asociación han recibido la convocatoria por medio del Boletín, pero os animamos a venir también para hablar del futuro y los planes de la asociación.

Este año corresponde renovar la directiva de la asociación. Cualquier socio puede ser candidato a miembro de la directiva, y te animamos a que te lo plantees. Contacta con la actual Directiva, si tienes cualquier duda.

Y si aún no eres miembro puedes afiliarte en: http://www.esperanto.es/inscripcion

www.esperanto.es
FEDERACIÓN ESPAÑOLA DE ESPERANTO
HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

**RESTAS MALMULTAJ TAGOJ POR LA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO!**


Restas tre malmultaj tagoj por la komenciĝo de la 82a Hispana Kongreso de Esperanto. Memoru ke la elektita loko estas la impona Eduka Komplekso (antaŭe konata kiel la Labora Universitato) en la urbo Cheste, proksima al Valencio. La 5an de septembro oni bonvenigos la vizitantojn, kaj ni havos aktivaĵojn ĝis dimanĉo la 8a, sed krome, tiuj kiuj povos resti pli longe povos konatiĝi kun Valencio kaj ties

ĉirkaŭaĵoj en serio da postaj ekskursoj.

Memoru ke eblas gasti kaj manĝi en la Komplekso mem, kun tre favoraj prezoj. Oni ampleksigis la periodon por rezervi ĝis la 30a de aŭgusto (oni ne povas certigi la disponeblon por tiuj alvenantaj en la lasta momento)

Vi povas aliĝi kaj koni aliajn detalojn en la retejo de la Kongreso. Multaj aliaj detaloj estas aktualigataj en tiu ĉi paĝo de EventaServo. Krome, vi povas aliri la kanalon de Telegram ĉe la adreso: https://t.me/HispanaEsperantoKongreso, por koni la lastajn novaĵojn.

Baldaŭ ĉeeste en Cheste!




## ESPERANTO EN VIRTUALA MUZEO PRI LA HISPANA MILITO

La sola virtuala muzeo pri la hispana enlanda milito enhavas nun tekston pri la uzo de Esperanto dum tiu historia evento.

La muzeo (pri kiu eblas legi pli en jenaj ĵurnalaj artikoloj:1 kaj 2) enhavas multajn paĝojn kaj bildojn pri la milito en ĉiuj ties vizaĝoj, el la bataloj aŭ la internacia kunteksto ĝis la ĉiutaga vivo kaj la spertoj de la ordinaraj homoj. Ĝi estis kreita de scienca konsilio en Kanado, kaj troviĝas en: https://vscw.ca/. La plejmulto el la paĝoj havas versiojn en la hispana, la franca kaj la angla, kaj kelkaj en la ceteraj hispaniaj lingvoj.

La teksto pri Esperanto estas legebla en jenaj adresoj: https://vscw.ca/index.php/es/node/480 (hispane), https://vscw.ca/index.php/fr/node/480 (france) kaj https://vscw.ca/index.php/en/node/480 (angle)




**ESPERANTO EN RADIO 3**

La ŝtata radiostacio pri muziko kaj kulturaj tendencoj, Radio 3, dediĉis epizodon de sia podkasto *Blablando* al Esperanto, per longa intervjuo al Vicente Manzano (Viko). Vi povas ĝin aŭskulti en tiu ĉi ligilo.

**NOVA KUNVOKO DE LA KURSOJ DE ESPERANTO EN UNIVERSITATO UNED**

La Nacia Universitato por Neĉeesta Edukado (Universidad Nacional de Educación a Distancia, UNED) pere de sia Centro pri Lingvoj anoncis la baldaŭan malfermon de la enskribiĝo por la venonta akademia jaro, inklude de la kurso de Esperanto en ties du niveloj A2 kaj B1. La enskribiĝo malfermiĝas la 5an de septembro kaj finiĝas la 22an de oktobro. Estu atenta!

Ni memorigas ke la anoj de la Federacio ĝuas tre altiran rabaton en la kosto de la enskribiĝo. Plian kialon por aniĝi!




**NOVA INTERKONSENTO INTER HEF KAJ LA MINISTERIO PRI KULTURO**

Hispana Esperanto-Federacio kaj la Ministerio pri Kulturo subskribis novan interkonsenton por reguligi la provizadon de metadatenoj kaj bildetoj en la Bitoteko de Hispana Esperanto-Federacio al la Ministerio kaj, pere de tiu ĉi lasta, al la eŭropa retarkivo Europeana.

La interkonsento estas publikigita en la Oficiala Ŝtata Bulteno (Boletín Oficial del Estado, BOE). Kaj ni ricevis la konsenton de la Ministerio publikigi ĝin ankaŭ en Bitoteko. En ambaŭ lokoj vi povas legi la kompletan tekston.

**SUKCESO DE LA UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO EN AFRIKO**

Kiel ni jam informis en pasintaj Bitbultenoj, dum tiu ĉi monato aŭgusto disvolviĝis la Universala

Kongreso de unuafoje en Afriko. Laŭ ĉiuj atestoj ĝi rezultis en granda sukceso, kun alta partopreno de afrikaj esperantistoj, malgraŭ la malfacilaĵoj pri vizoj kaj transporto.

Hispana Esperanto-Federacio estis reprezentita en la Movada Foiro, okazinta la unuan tagon, kun granda akcepto kaj intereso, En la foto en la hispanlingva parto vi povas vidi la aspekton de nia budo.

Kiel tradicie, dum la kongreso okazis la anonco de la rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA. Vi povas legi la anoncon en tiu ĉi ligilo aŭ aŭskulti ĝin en tiu ĉi alia. Kaj vi povas spekti ankaŭ videon kun gratulvortoj de la Prezidanto de la juĝkomisiono, Miguel Fernández.




## RENOVIGO DE LA ESTRARO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La 8an de septembro, dum la Hispana Kongreso en Cheste, okazos Ordinara Ĝenerala Kunveno de Hispana Esperanto-Federacio. La anoj jam ricevis la kunvokon pere de la revuo Boletín, sed ni jam invitas interesatojn veni, ankaŭ por paroli pri la estonto kaj la planoj de la asocio.

En tiu ĉi okazo oni laŭstatute renovigos la estraron de HEF. Ĉiu ano povas kandidati, kaj ni invitas vin pripensi vian eblan kunlaboron. Kontaktu kun la nuna estraro se vi havas dubojn.

Kaj se vi ne estas ano de HEF, vi trovos aliĝilon ĉe la adreso: http://www.esperanto.es/inscripcion